



EKO 2015-8 dissendita en la 21a de marto 2015 (kun postkorektoj 24an de marto)

Al: Landaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne), Fakaj Asocioj, la Komitato, Konsilianoj, ILEI, TEJO, listoj kaj unuopuloj

Strategia Forumo pri Azio kun la prezidanto de UEA

En la 19-a de aprilo kurantjare okazos en Hangzhou la malferma ceremonio de Filmo-Festivalo (<http://esperanto.cri.cn/filme>), aŭspiciata de UEA, Esperanto-redakcio de Ĉina Radio Internacia kaj pluraj ĉinaj instancoj. Profitante la viziton de la prezidanto de UEA, d-ro Mark Fettes, estas aranĝita kunsido de Orientaziaj gvidantoj kaj motoroj de KAEM por diskuti pri la azia movado kun la titolo 'Strategia Forumo de UEA pri la Orientazia Movado'. Ĝi okazos tra kvin horoj en la 20a de aprilo. Estas invititaj dek du reprezentantoj el kvin landoj, kune kun reprezentantoj de ILEI, IKEF kaj eble aliaj.

Retpaĝoj pri niaj komunikoj kaj AMO viziteblaj

Tra lastaj semajnoj el intensa laborado rezultis paĝaro, kiu entenas la kolekton da komunikoj en 2015 kaj 2014. Ili nun ricevas la nomon EKO (Estrara Komunikado) por distingi ilin de la Gazetaraj Komunikoj (GK) kreitaj de la Centra Oficejo. Tie aperas nur la tekstoj de la komunikoj; ni serĉadas pli bonan solvon, por povi aperigi la multe pli belajn ilustritajn PDF-versiojn de la komunikoj. Por 2015 ekzistas temindekso, kiu kreskos kune kun la jarkolekto. Por kompletigi la kolekton de 55 komunikoj el 2014 ni daŭre laboregas. Bonvolu rigardi:

http://uea.org/vikio/index.php/Komunikado_kun_LA_FA...

La paĝaro pri la AMO-progrAmo simile havas enhavon pri ĉiu okazinta seminario, kune kun enkondukaj materialoj. Denove, nur simplaj, mallongaj tekstoj. Restas plenumenda nia aspiro povi afiŝi pli ampleksajn materialojn, sed almenaŭ estas farita komenco:

http://uea.org/vikio/index.php/Aktivula_Maturigo

La AMO-programo ekhavis sian paĝon en Vikipedio, kvankam restas kelkaj transigaj taskoj por bonigi ĝin. Aprila tasko estas krei analogan anglalingvan paĝon (do ne pura traduko) kiu prezentas la programon enciklopediece al ekstera publiko. Poste ni retradukos tion al Esperanto, cele al kreo de informa paĝo en multaj lingvoj. Iru al Vikipedio kaj serĉu 'Aktivula Maturigo'.

UEA partoprenos en eduka forumo

La plejlasta en serio de mondaj konferencoj okazos en la korea ĉefurbo Seŭlo de la 19a ĝis la 22a de majo. Feliĉe UEA havas tie modele aktivajn Landan Asocion kaj estraron. Ili akceptigis aktivan partoprenadon kaj faras la preparlaborojn, kiuj inkluzivos budon (akceptita kiel unu el nur naŭ permesataj budoj!). La konferenco revenas al la Jarmilaj Evoluigaj Celoj, i.a. kun la optimisma plano realigi universalan aliron al elementa instruado ĝis 2015. Multo estas atingita, sed multo restas fareda,

kiel dokumentis la artikolo 'Unesko pri la graveco de instruista trejnado' en revuo *Esperanto* de majo 2014 (p 99). Tio resumis la 52-paĝan resumon de la plena 477-paĝa raporto kiu centras en la procezo, kaj revenos por plia traktado en la seŭla konferenco. Pli kompleta resumo aperis en numero 2014-2 de *Internacia Pedagogia Revuo*, la organo de ILEI, ekde p. 6. La celo de la Monda Forumo estas definitivigi planojn por efektive realigi la neplenumitajn celojn de la jarmila plano. Projekt-dokumento por la Forumo troviĝas en la angla, franca, hispana kaj araba, kaj estas riceveblaj laŭpete.

Komitata protokolo je dispono

Komitatanoj kaj membroj povas aliri la protokolojn de la komitataj kunsidoj en Bonaero en julio 2014:

<http://www.uea.org/l/teko/komitataj>



Virinoj antaŭenpaŝas en nia afrika movado

S-ino Monique BADIENGISA el Kinŝaso, prezidantino de nove kreita E-grupo «EVIK» (Esperanta Virinaro Kongalando) raportas: 'Nia E-grupo organizis la 8-an de Marto 2015, ceremonion pri la Tago de la Virino. Pli detale vi legos en revuo *Esperanto*.



La prezidantino de EVIK instruas.

Ĉina provinco kunaboremas kun Lillo

La estraro de la Liaoning-provinca Esperanto-Asocio (LEA) en Ĉinio kunsidis en Shenyang, ĉefurbo de la provinco. Prezidanto Liu Zhengkun diskutigis kiel festi la 30-an datrevenon de LEA kaj la centan UK. Por la 30-a datreveno LEA solene festos en taŭga tempo, eldonos verkaron, kaj el diversaj gratulmesaĝoj ricevitaĵoj, okazigos foto-ekspozicion, kaj organizos Servo Tagon (simila al nia Ago-Tago) por konigi Esperanton surstrate. Por la 100-a UK la asocio faros prelegojn en kelkaj universitatoj kaj kreos eblon por en la 100-a UK kontaktigi la urbodomojn de la du urboj: Shenyang, la plej granda urbo en la nordo de Ĉinio, kaj Lille, la plej granda urbo en la nordo de Francio, kun plia eblo por komuna konsidero: ĝemeligi la du urbojn.

Preparkunsido por AMO 11

En la 14a de majo ekos tiu seminario en Svedio. Precize du monatojn antaŭe en Skövde, SEK okazigis plankunsidon. Raportas Stella Lindblom: 'Dek homoj kunsidis pri la temo Informado. Unue ni diskutis la grandajn ŝanĝojn en SEF kaj la stranga situacio en Svedio kun pluraj Esp-aj organizoj kiuj malmulte kunlaboras. Dum la tago ni kreis liston kun eroj bezonataj, ekz. informiloj al novaj membroj, informiloj pri laboro en SEF kaj kluboj, informiloj pri manieroj uzi Esperanton per komputilo kaj aŭskulti radion kaj aliajn elsendojn, konsiletoj por kluba agado (lingva festo, interŝanĝo de prelegantoj de aliaj organizoj ktp), konsiletoj al membroj kiel varbi, kaj ke bezonatas pli amuzaj aferoj kaj kursoj. La precipa ideo surfaciĝis krei surboatajn kursojn sub rubriko "Paroli Esperanton flue". Nun ni havas planon KE ni faru tion, sed ni ne bone scias ĝuste KIEL. Tion ni volas lerni dum la AMO-seminario.'

Intertempe, UEA esploras, ĉu SEJU (la sveda landa sekcio de TEJO) iel plue ekzistas, por taksu la perspektivojn tie restarigi kunlaboron. **SMG: Ŝajnas, ke jam malfondis sin, do nova solvo necesos.**

Aliĝoj al tiu seminario bonvenaj: <http://esperantosverige.se/eventoj/amo-seminario-pri-informado>

ILEI anoncas novaĵojn pri la Tria Tutmonda Kolokvo

Tio okazos de la 13-a ĝis la 16-a de majo 2015 en Neuchâtel kaj La Chaux-de-Fonds, Svislando. La programo enhavas 12 prelegantojn el 11 landoj, inter ili tri akademianojn. Plej bunta kaj riĉa programo pretas. En la retejo pri la Kolokvo TTK vi povas vidi la detalan programon, la lokojn kaj plenigi aliĝilon.

www.ilei-mondo.info/ttk/

Raporto de la Afrika Komisiono por 2014 liverita

Alvenis kompleta sed konciza raporto, kun bona strukturo. Ni aldonas tion en alkroĉaĵo. Simile venis raporto de la Azia Komisiono (KAEM), kiu jam disiris kun EKO 6. Ambaŭkaze, modela kontinentuskala kunordigo.

Nomitaj Tagoj en nia Universala Kongreso

La Estraro konfirmas la pluuzon de dediĉitaj Tagoj en UK, kiu bone funkciis en Bonaero. La lundo estos la Tago de Konsciigo, ene de kiu funkcios la tradicia Kleriga Lundo. La mardo estos la Tago de Kapabligo, ene de kiu funkcios la egale tradicia programo de ILEI 'Tago de Lernado'. Ĵaŭde okazos la Tago de Komunumo kaj vendrede la Tago de Kunordigo, ene de kiu okazos la konkluda (kaj publika) kunsido de la Komitato de UEA. Tipe okazas matene trihora seminaria programo, la unua horo enkonduka, la sekvaj laborgrupaj. Samtipe okazas publikaj forumoj pri la temo de l'Tag', kiuj formulos rekomendojn por la Komitata kunsido en vendredo. Vidu la retejon de LKK www.lille2015.fr por aktualigoj de informoj pri ekskursoj kaj aliaj temoj, kompare kun la presita Dua Bulteno. Okazos Internacia Infana Kongreseto (IIK).

Pri tio vidu: www.iik.lille2015.fr. La mendilo por fakaj kunvenoj (limdato la 31a de marto) aperis nun ĉe http://www.uea.org/pdf/salon_budmendilo_lillo_2015.pdf

Ni kandidatigu nin por premio de Unesko

Alvenis la kvara alvoko por la UNESKO-Hamdan bin Rashid Al-Maktoum premio por Elstaraj Agadoj kaj Atingoj en la Efikigo de Instruistoj. La premion oni aljuĝas ĉiun duan jaron por iniciatoj, kiuj bonigas edukon praktikadon ĉirkaŭ la mondo, prioritare en evolulandoj kaj en marĝenigitaj aŭ malavantaĝataj komunumoj. La premio de \$300 000 estos dividita inter tri gajnintoj. Kandidatoj povas esti unuopuloj reprezentantaj organizojn, aŭ organizoj mem – naciaj aŭ internaciaj (NROj), edukaj aŭ esplor-institutoj aŭ lokaj/naciaj/regionaj komunumoj. Limdato por kandidatigoj: la 31a de oktobro, 2015.

UEA kaj ILEI pretas helpi al organizoj pretigi kaj subteni kandidatigojn (kiuj, bedaŭrinde devas esti franc- aŭ angla-lingvaj). Skribu al Stefano Keller (stefano.keller.uea@linguistic-rights.org) kaj Renée Triolle (triolle.renee@wanadoo.fr) por pliaj informoj kaj gvido.

Norda Afrko – intensiĝas nia okupiĝo!



La 8a Mezorianta Kunveno en Hamameto, multfoje menciita, akiris hodiaŭ sian 71an aliĝinton. Pluraj, reage al la tragediaj eventoj de la lastaj tagoj, konfirmis sian intencon partopreni, kaj esprimis solidarecon kun la popolo de Tunizio.

Samtempe, la 30an de marto, forflugos Maroken Evelyne Rotellini kaj Jean-Pierre Marcq (Jopo), instrui Esperanton al grupo de marokanoj, inter ili du alilandanoj : Rachel kaj Hassan. Ili skribas: “Ni foriros, Jopo kaj mi, du semajnojn, ĉar fine de nia restado, okazos granda evento : *Casablanca autrement*, kie ni havos nekredeblan okazon prezenti budon pri Esperanto. Kompreneble, temas pri nia unua esperanta sperto en Maroko ! Mi antaŭĝojas, fieras, kaj iom timetas, ĉar ni devos instrui homojn, kies lingvo estas la araba, kun alia alfabeto, alia strukturo, alia kulturo... Jen defio !”

La supran mesaĝon plusendis Adjévi Adjé (gvidanto de la Afrika komisiono de UEA). **SMG: la originala dissendo enhavis miskomprenon, ke Adjévi kaj Jopo irus.**

Lastaj meditoj: Unu jaro kaj unu semajno...

...pasis inter la fermo de la unua AMO-seminario ĝis la malfermo de la deka. Kia vojaĝo!

Malneto mar 18 (1271 vortoj). Definitiva mar 21 (1415 vortoj). EKO 8 2015-03-21 Diverstema